



Programlibro

SES 2014 RU



Koltiŝevo, Rusio

17. – 25.08.2014

Salutvorto de organizantoj

Saluto de SES-organizanto



Estas tre agrable konstati, ke jam naŭan fojon ni havas la eblon kaj honoron okazigi SES – kaj ĉi-foje eĉ unikan, unuan fojon ekster Slovakio, en Rusio, dua SES en unu jaro! La aranĝo dum la jaroj evoluas kaj kio ankaŭ organizantojn tre ĝojigas – kreskas. Ni strebas okazigi aranĝon, kiu estu samtempe eduka kaj amuza – ja ne facilas tasko :) Tamen via partopreno konfirmas, ke ekzistas intereso pri ĉi-speca aranĝo. Ni elkore dankas al vi, ke vi decidis veni, riĉigi tiel la aranĝon – kaj efektive ja entute ebligis ties okazigon. Ni ankaŭ esperas, ke la aranĝo plu evoluos, pliboniĝos (kvalite, enhave, kvante) – pri tio ni bezonas vian helpon – partoprenu aktive la aranĝon, helpu al ni informi pri ĝi, kontribuu al la programo, venigu ankaŭ viajn konatojn ktp.

Persone mi ŝatus tre danki ĉefe al instruistoj (kiuj estas la plej grava parto de la instruista parto de SES) kaj ĉiuj aliaj (helpantoj, organizantoj, artistoj ktp.), kiuj kunkreas kaj ebligas tiun ĉi aranĝon. Mi ankaŭ certas, ke la ĉi-foja okazigo de SES en Rusio havos siajn specifajn trajtojn, kiuj ja povas riĉigi la aranĝon kaj etosigi ĝin en rusa maniero.

Fine nur deziro: ĝuu la aranĝon, lernu Esperanton kaj uzu ĝin – por tio ĝi ja estis kreita!

Peter Baláž (Petro)

E@I-kunordiganto, SES RU-kunorganizanto

Приветствие SES-организатора

Приятно отметить, что уже девятый раз нам представляется честь и возможность провести SES - и на этот раз необычный - впервые за пределами Словакии, в России, и впервые второй в течение одного лета! Мероприятие развивается и, к радости организаторов, растёт. Мы стремимся создать событие, одновременно учебное и развлекательное, а это непростая задача :) Однако ваше участие

подтверждает, что интерес к такого рода мероприятиям существует. Мы сердечно благодарим вас, что вы решили приехать и этим обогатить нашу школу – а по большому счёту обеспечить её существование. Мы также надеемся, что мероприятие будет развиваться, улучшаться (содержательно, качественно и количественно) – и для этого мы нуждаемся в вашей помощи: активно участвуйте в мероприятии, помогайте нам информировать о нём, вносите свой вклад в программу, приводите ваших знакомых и т.д.

Лично я хотел бы поблагодарить преподавателей (которые являются основной составляющей учебного процесса) и всех остальных (помощников, организаторов, артистов), которые все вместе создают условия для того, чтобы мероприятие состоялось. Я также уверен, что SES в России будет иметь своеобразные черты, которые обогатят его особой русской атмосферой. В заключение единственное пожелание: получайте удовольствие от мероприятия, учите эсперанто и используйте его – ведь именно для этого он и был создан!

Петер Балаш (Петро)

E@I-координатор, SES RU-организатор

Saluto de loka organizanto



Karaj partoprenantoj!

Mi kore salutas vin en la nova por Rusio internacia Esperanto-aranĝo – la Somera Esperanta Studado. Mi gratulas vin okaze de via elekto veni ĉi tien: vi partoprenos la eventon apriore historian – ja la rusa SES daŭrigas la jam tre faman kaj gloran vicon de SES, jam dum 8 jaroj okazantaj en Slovakio. Tio estas la lernejoj, kiuj allogas la plej elstarajn E-instruistojn kaj artistojn, la plej grandan kvanton da kursanoj, kaj kiuj, sendube, firme evoluigis la E-edukadon en la tuta mondo. Mi fieras, ke la slovakaj SES-organizantoj elektis ĝuste la Moskvan Esperanto-Asocion MASI kiel la unuan eksterslovakian lokan kunorganizanton de la Studado. Ni kredas, ke post Rusio venos ankaŭ aliaj landoj, eble, eĉ pli foraj de la centra Eŭropo. Tial nia SES estas la sekva grava paŝo por antaŭigi la Esperantan studadon tra la tuta mondo.

Mi multe dankas al ĉiuj homoj, kiuj kontribuas nian programon, speciale al niaj elstare bonaj instruistoj kaj prelegantoj! Tamen la vera sukceso estas via sukceso, karaj studantoj! Ĝi multe dependas de via fervoro lerni, kuraĝe kaj obstine ĉiam kaj ĉie paroli en Esperanto, aktive partopreni nian riĉan programon, ĝue kunagadi, amikiĝi kaj gaje pasigi la tempon.

Mi kredas, ke la unua SES en Rusio pasos sukcese, iĝos evento utila, kleriga, interesa, amika, distra kaj festa por ni ĉiuj. Mi esperas, ke ĝi iĝos grava bazo por disvolvo de Esperanto-edukado kaj Esperantomovado en Rusio, de internacia kunagado inter esperantistoj, helpos altigi konscion kaj respondecon de ĉiu partoprenanto pri la evoluo de Esperanto en nia lando kaj en la mondo, kreos la novan terenon por interkompreno kaj amikeco!

BONVENON!

***Irina Gončarova (Mirina)**
kunordiganto de MEA MASI,
loka organizanto de SES 2014 RU*

Приветствие организатора SES в России

Уважаемые участники!

Сердечно приветствую Вас на новом для России международном эсперанто-мероприятии – Летней эсперанто-школе SES 2014 RU. Поздравляю вас с правильным выбором: вы будете принимать участие в событии априори историческом – ведь российская эсперанто-школа продолжает ряд широко известных и любимых школ, уже 8 лет проходящих в Словакии. Это школы, которые привлекают самых выдающихся эсперанто-преподавателей и артистов, собирают самое большое количество учащихся и которые, безусловно, вносят непревзойдённый вклад в развитие эсперанто-образования. Мы гордимся тем, что SES-организаторы выбрали в качестве своих первых зарубежных партнёров Московскую эсперанто-ассоциацию MEA MASI. Мы верим, что за Россией последуют другие страны, возможно, еще более отдалённые от центральной Европы. Таким образом, наш с вами SES является следующим шагом, продвигающим эсперанто-образование во всём мире.

Я очень благодарна всем, кто вносит вклад в программу российской школы, особенно нашим замечательным преподавателям и лекторам! Однако действительный успех – это ваш успех, дорогие курсанты! Он во многом зависит от вашей страсти к учёбе, смелости и упорства всегда и везде говорить на эсперанто и активно участвовать в нашей богатой программе, стремления получать удовольствия от совместной работы, от новых знакомств, от интересного и весёлого совместного отдыха.

Я верю, что Первая эсперанто-школа в России пройдёт успешно, станет событием полезным, просветительским, интересным, дружеским и праздничным для всех нас. Я надеюсь, что она

станет важным поводом для развития эсперанто-образования и эсперанто-движения в России, для международного сотрудничества, поможет повысить осознанность и ответственность каждого участника за развитие эсперанто в нашей стране и в мире, создаст новую почву для взаимопонимания и дружбы!
ДОБРО ПОЖАЛОВАТЬ!

Ирина Гончарова (Mirina)
координатор MEA MASI,
организатор SES-2014 в России

Saluto de la *lernu!*-teamo

Bonvenon!

Ni ĝojas ke vi venis por studi Esperanton en la unua rusa SES! Ĉi tie vi ne nur plibonigos viajn kapablojn en Esperanto, sed ankaŭ renkontiĝos kun la varma kaj amikema komunumo de Esperanto-parolantoj. Kiel vi eble jam aŭdis, ni nun pretigas novan version de la paĝaro lernu.net kaj pro tio serĉas volontulojn por helpi nin en tiu grava laboro; teknika sperto kaj alta nivelo de Esperanto ne estas necesaj. Ni invitas vin aliĝi al nia teamo! Ĉi-semajne, lernu, amuziĝu, kaj parolu Esperanton kun viaj novaj amikoj; ni esperas ke la bela sperto ĉi tie inspiros vin kontribui al la lernu!-komunumo kaj fariĝi volontulo ĉe lernu!

Skribu al teamo@lernu.net por ekhavi pli da detaloj pri tio, kiel vi povas helpi nin.

Bonan lernadon!

Jevgenij, Neringa, kaj Erinja

la teamo de lernu.net



Добро пожаловать!

Мы рады, что вы приехали изучать эсперанто на первую в России международную эсперанто-школу! Здесь вы не только улучшите свои навыки в языке, но и встретитесь с теплой и доброжелательной эсперанто-средой. Возможно, вы слышали, что мы сейчас готовим новую версию сайта lernu.net и ищем добровольцев для помощи в этом важном деле. Технический опыт и высокий уровень эсперанто для этого не требуется. Мы приглашаем вас присоединиться к нашей команде! На этой неделе вы учитесь, веселиться, говорят на эсперанто с вашими новыми друзьями. Мы надеемся, что яркие добрые впечатления, полученные здесь, вдохновят вас внести свой вклад в развитие *lernu* и вы захотите стать нашим волонтером!

Чтобы получить более подробную информацию о том, как вы можете помочь нам, пишите на: teamo@lernu.net

Успехов в учёбе!

Jevgenij, Neringa и Erinja

команда lernu.net

Organiza teamo

SES kaj ĝia organizado estas tute nova afero por rusiaj esperantistoj, tial la loka teamo estas ankoraŭ ne sufiĉe forta. Sed ni ja neniam estas solaj, nin subtenas la spertaj SES-organizantoj de E@I. Ni kredas, ke kune ni sukcesos bone plenumi ĉiujn taskojn, des pli, se nin subtenos vi, la partoprenantoj, eble, helpante organize kaj nepre – estante lernemaj, disciplinemaj, ne tro kritikemaj, pardonemaj kaj bonhumoraj!



Peter Baláž (SK)
– ĉeforganizanto



Mirina (RU) –
loka organizanto,
programo, informado



Dorota Rodzianko
(PL) – financoj,
administrado



Julia Samsonova (RU)
– tagordo, ekskursoj,
aspektigo



Svetlana Smetanina
(RU) – Moskvoj
Tagoj, vizoj



Darja Zelenina (RU) –
novula programo



Leon Schneldorfer
(SK) – sporta
programo



Jekaterina Lozina
(RU) – majstroklaso,
manĝoj



Matthieu Desplantes
(FR) – kinejo,
retpaĝaro, teknikaĵoj



Artur Gtigorjev (RU)
– ludejo



Aleksandr Lebedev
(RU) – paĝaro
studado.ru

Kontaktoj:

E@I: <http://ikso.net>

Moskva Esperanto-Asocio MASI: <http://www.ek-masi.weebly.com>

Oficiala paĝaro de SES: <http://ses.ikso.net/2014/ru/>

SES 2014 RU Vkontakte: http://vk.com/ses_rusio

Retejo por lerni Esperanton: www.lernu.net

Lingva studado



Уровень А

Aleksandr Blinov

г. Чебоксары

Молодежная Ассоциация Эсперантистов Чувашской Республики (JEAĈR)

Aleksandr Blinov – выдающийся эсперантист и общественный деятель в области сохранения и развития чувашского языка, первый организатор фестивалей языков в России. Основатель и вдохновитель Эсперанто-ассоциации Чувашской Республики (EAĈR), сейчас он руководит собственной фирмой, работает переводчиком и преподаёт в частной школе французский, итальянский и чувашский. Став эсперантистом в 1986, он много и успешно преподаёт эсперанто, в частности, по авторской методике «Путешествие в Африку».

Этот курс для тех, кто совершает самые первые шаги в постижении эсперанто. Однако сразу же мы будем много общаться, практикуя язык в разговорах на различные темы. Особое внимание мы уделим вопросам, связанным с языками. Во время занятий мы будем играть, ставить небольшие сценки и даже заниматься гимнастикой.

Nívelo A


Aleksandr Blinov

u. Ĉeboksari

Junulara Esperanta Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (JEAĈR)

Aleksandr Blinov estas elstara esperantisto kaj sociaganto por la ĉuvaŝa lingvo kaj kulturo, lanĉinta la movadon de Lingvaj Festivaloj en Sovetunio. Li estis fondinto kaj enspiranto de la Esperanta Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (EAĈR)ka nun estras la propran firmaon, estas tradukisto kaj instruisto en privata lernejo pri la franca, la itala, la ĉuvaŝa kaj Esperanto. Iĝinte esperantisto en 1986, li multe kaj sukcese instruis Esperanton laŭ la aŭtora interaktiva metodo "Vojaĝo al Afriko".

Tiu ĉi kurso estas por tiuj, kiuj faras nur la unuajn paŝojn en ekposedo de Esperanto. Tamen ni tuj multe interkomunikigōs, praktikante la lingvon dum parolado pri diversaj temoj. Speciale ni atentos la temojn, ligitajn kun lingvoj. Dum la lecionoj ni ludos, iom aktorumos, eĉ gimnastiketos.



Nívelo B1

Szabolcs Szilva

Hungario-Pollando

Szabolcs Szilva, konata kiel Sabi, estas hungaro, loĝanta en la pola ĉefurbo Varsovio. En 2011 li finis Instruistan Trejnadon en la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano (PL), kie li ankaŭ studas pri Interlingvistiko kaj specialiĝas pri instruado. En Varsovia Universitato li magistriĝas pri finnugra filologio. Sabi instruas Esperanton jam 5 jarojn en la plej diversaj kursoj.



Nívelo B2

Darja Zelenina

u. Ĉeljabinsk

Darja Zelenina (u. Ĉelabinsko) profesie estas specialisto pri ĝermanaj lingvoj kaj interkultura komunikado, dum kelkaj jaroj laboris kiel tradukisto kaj lingvoinstruisto, kaj

nun organizas fremdlingvajn parolkubojn kaj skribas por la paĝaro pri lingvaj eventoj en la urbo, podkastas pri lingvoj. Ŝi esperantistiĝis antaŭ kvin jaroj kaj ekde tiam aktive partoprenis E-aranĝojn. En SES-R Darja gvidas novulan programon.

Ĉu vi jam parolas Esperanton, sed mankas al vi vortoj por pli precize aŭ bunte vin esprimi? Venu al la kurso por la nivelo B2, kiu helpos al vi perfektigi vian gramatikon kaj pligrandigi vian vortprovizon por senlime regi la Lingvon Internacian. Ni ludos, solvos enigmojn, verkos, aktoros, debatos kaj pridiskutos plej diversajn temojn sole en Esperanto.



Nivelo C

Aleksandro S. Melnikov, d-ro hab., membro de la Akademio de Eo u. Rostov-na-Donu

Esperanto: lingvokulturologia kaj instru-metodika aliroj Kurso

Melnikov Aleksandro S. (1951), esperantisto ekde 1965, elstara movadano, diplomita Ĉe-instruisto, doktoriĝis per interlingvistika disertacio (1990), habilit(aci)igis (2004) per disertacio, kiu montris kial kaj kiel en Eo eblas produkti, konservi kaj transigi kulturaĵojn, kio similigas la E-komunumon al etno, kiujn specifajojn havas lingvopersoneco de „tipa esperantisto“ ktp. Laŭreato de akad. Paul Ariste-premio (pro interlingvistikaj meritoj, 2009). En 2013 elektiĝis kiel membro de la Akademio de Esperanto. En la rusa kaj Eo Aleksandro (kun)verkis dekon da libroj kaj centon da artikoloj. Ekde 1968 gvidis E-kursojn (ekde 1986 laŭ la propra metodo "Instruado – sen turmentado!") kaj seminariojn en pluraj urboj de Rusio kaj la mondo; lekciis ĉe la Postdiplomaj Interlingvistikaj Kursoj de la Poznana Universitato (Pollando); prelegis pri ĝeneralaj, interlingvistikaj, esperantologiaj, E-movadaj kaj E-metodikaj temoj en dudeko da landoj de 4 kontinentoj.

Ĉiu, kiu profesie laboras kun etnaj fremdaj lingvoj, scias, ke por "plena posedo" ne sufiĉas eĉ superbona elparolado de la sonoj, parkera ellerno de la tuta gramatiko (por la esperantistoj – PAG aŭ PMEG kun siaj centoj da paĝoj) kaj senescepta memorfikso de la tuta leksikono (por ni – (N)PIV kun ĉ. 17 mil radikoj). Restas ankoraŭ frazeologio, parol-etiketo, stilaj specifajoj kaj multo alia. Aparte gravas, ke adekvata kompreno de ajna lingvo ne eblas i.a. sen **kulturaj fonaj scioj** specifaj por la koncerna etno, ĉar ĉiu kulturo respeguliĝas en la koncerna lingv(a)ĵo.

En nia kurso ni analizos, kial kaj kiel en Eo eblas produkti, konservi kaj transigi kulturaĵojn, kio rilatas al la specifaj fonaj scioj de „tipaj esperantistoj“, kio estas apartaĵoj de la esperantista lingva personeco, kio estas esperantonimoj kaj kiel ili formiĝas.

Plia specifajoj de „profesia esperantisto“ estas, ke li/ŝi ofte rolas kiel instruanto. Tial estos prezentitaj kelkaj elementoj de „Instruado sen turmentado! Aŭ: Kiel instrui tedaĵojn distre“.

Specialaj kursoj

Mikaelo Bronŝtejn estas elstara movadano, konata bardo, poeto kaj verkisto. En sovetia tempo li estis aktiva membro (poste ankaŭ kungvidanto) de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado) kaj nun restas senlaca populariganto de E-kulturo en Rusio kaj eksterlande. Krome li originale verkis kaj tradukis pli ol 40 librojn, estas aŭtoro de kelkcent poemoj kaj kantoj en Esperanto. Li estas laŭreato de prestiĝa literatura premio "Antoni Grabowski" (2003). Dum tuta sia E-aktiva periodo Mikaelo gvidas diversnivelaĵajn E-kursojn, inkluzive tiujn por la tradukistoj el diversaj landoj de la mondo.



Vagado en la tradukbaro

Kvarseria kurso-meditado pri areto da problemoj, turmentantaj espajn tradukemulojn.

Enhavo :

- Ĉirkaŭ la artikolo
- Tiuj teruraj verboj
- Metamorfozoj de insektoj



- Aĥ, Puŝkin, Puŝkin...
- Tradukista leksiko - stiloj kaj niveloj
- Ĉu indas traduki kantojn?
kaj tiel plu.

Speciala kurso: la rusa lingvo

La rusa estas facila!

De la alfabeto ĝis la kulturajoj

Instruisto : Natalja Laziĉ

18-25 de aŭgusto, 9.30-13.30

Por komencantoj kaj progresantoj en la studado de la rusa



Natalja Laziĉ en la jaro 2008 finlernis ĵurnalistikon en la Moskva ŝtata universitato kaj en la sama universitato ricevis la specialecon "Instruisto de la rusa lingvo kiel fremda". Ekde tiam jam dum 6 jaroj ŝi instruas la rusan lingvon al eksterlandanoj – homoj de diversaj nacioj, aĝoj kaj profesioj. Preskaŭ 4 jarojn Natalja vivis kaj instruis la rusan en Serbio, en la Academy Language Centre (urbo Novi Sad). Partopreninte en la pasinta jaro la Moskvan Lingvan Festivalon kiel prezentanto de la serba lingvo, Natalja ekinteresiĝis pri Esperanto kaj sukcese finis la bazan paroligan kurson.

Ĉu vi neniam lernis la rusan lingvon? Eble vi scias kiel diri "dankon", "saluton", vi scias, ke la rusa alfabeto estas cirila? Aŭ vi opinias, ke vi ne povas paroli, kvankam iam lernis la rusan, konas la alfabeton kaj la bazon de la gramatiko? Aŭ vi jam povas paroleti, sed volas scii pli? Dum la kurso ni kantos, ludos, kaj, kompreneble, parolos en la rusa. Vi ekpovos konatiĝi, rakonti pri vi, demandi pri la vojo, mendi manĝaĵojn en restoracio. Vi ekscios multon novan pri Rusio, pri la rusa kulturo. Sed plej gravas, ke vi ekkredos, ke la rusa lingvo ne estas tiom malfacila!

Prelegoj kaj prezentadoj

Kiel „artefarita lingvo“ naturan kvazaŭetnon kreis

Aleksandro S.Melnikov

Membro de la Akademio de Eo, d-ro hab. Rostov-na-Donu

Ĉu Esperanto estas nur artefarita lingvo? Ĉu la esperantista komunumo estas nova tipo de sociero? Ĉu ĝi similas al etno? Ĉu ekzistas „tipa esperantisto“? Ĉu vi mem estas „tipa esperantisto“ aŭ... normalulo (malgranda testo por dezirantoj)?




Esperanto: kia oni vidas ĝin en referenc-libroj, enciklopedioj kaj sciencistaj rondoj; kaj kia ĝi estas fakte

Aleksandro S.Melnikov

Kion faru homo, kiu unuafoje renkontis la vorton Esperanto? Estus plej logike, se li/ŝi konsultus fidindan enciklopedion aŭ legus en renoma lingvistika libro. Tiam... li ricevus aron da misgvidaj informoj. Kiuj? Vi ekscios dum la prelego.

Reflektiĝo de la specifa esperanto-kulturo en publicistiko

Aleksandro S.Melnikov



— Jes, ankaŭ ŝi lernas Esperanton, ĉar ŝi volas rapide trovi edzon. (D. Wranka)

Adekvata percepto de publicistikaj tekstoj antaŭvidas komprenon de senco (kion diris la aŭtoro), kromsenco kaj pragmataj aspektoj (kion li alŭdis, kiun asocion atendas, ĉu li parolis serioze aŭ humure, satire, ironie, parodie, por kio li diris tion k.s.) kaj pritakson de la estetika / emocia konsistero (esprimecon). Ĉio ĉi ofte ne eblas sen haveco de specifaj fonaj scioj el la sfero de la Esperanto-kulturo, inkluzive sciojn pri la Esperanto-kulturaj "scenaroj", konceptoj, idealoj, kondut-specimenoj k.s. Apartan gravecon havas en publicistikaj Esperanto-tekstoj esperantonimoj – vortoj kaj vortkunoj, kiuj respegulas ekskluzive la Esperanto-kulturon kaj kiujn ne eblas "simple traduki" (sen kulturologia komento).



Jurnalisto: Pardonu, sinjoroj, ĉu estas vere, ke la organiza situacio en la Esperanto-movado estas harstariga? Teo Jung kaj Raymond Schwartz: Por ni nel (D. Wranka)

Eĉ esperantistoj kapablas ŝerci (pri vortludoj en Esperanto)


Aleksandro S.Melnikov

Vortludoj – nura amuzaĵo aŭ grava atributo de viva lingvo kaj reala komunikado? Kio en Esperanto kiel lingvo ebligas vortludojn? Kiuj tipoj de vortludoj en Esperanto (entute ĉ. 40) ekzistas? Prezento de la libro "Vortludoj kaj luda komunikado..." de la preleganto.

Rusa literaturo, tradukita al Esperanto

Nikolao Gudskov


Esperantigo de la rusa beletrio komenciĝis ekde la unuaj tagoj de la ekzisto de la lingvo, kaj nun preskaŭ ĉiuj gravaj rusaj poetoj kaj prozistoj, ekde "Eposo de militiro de Igorj" ĝis romanoj de fratoj Strugackij, ekzistas en Esperanto. Pri tradukado okupiĝis kaj okupiĝas eminentaj spertuloj – sed ankaŭ homoj kun malpi elstara talento. Dank' al tio la internacia E-kulturo pliriĉiĝas per la specifa gusto de la rusa kulturo, pens- kaj esprimmanieroj.



Originala Esperanto-literaturo: kontribuo de rusaj esperantistoj



Varankin



Nikolao Gudskov

Inter rusaj esperantistoj ekzistis pluraj elstaraj aŭtoroj de originala beletrio: pli da poetoj (Ĥoĥlov, Miĥalskij, Nekrasov, Logvin, Gusev, Tornado, Giŝpling kaj multaj aliaj), sed ankaŭ brilaj prozistoj (Ŝirjaev, Varankin, Bronŝtejn). Ili kreis kelkajn gravajn literaturajn skolojn, kiuj signife influis evoluon de la originala Esperanto-literaturo. Plej gravas, ke ili enkondukis en ĝin la stilajn rimedojn, pruntitajn el la rusa literaturo, trafe adaptante ilin al la vivo internacia.

Semantikaj primitivoj de Anna Vejbicka

Klera / Julija Samsonova
Moskvo, MEA MASI

Teorio de semantikaj universalajoj kaj bazaj konceptoj, kiun prezentis tutmonde fama lingvisto Anna Vejbicka, tre influis la evoluon de semantiko, kulturologio, filozofio kaj humanitarian ideumadon ĝenerale. Anna Vejbicka estas la unua, kiu penis ĉiufanke




priskribi lingvon kaj kulturon per la lingvo de semantikaj primitivoj – tiuj fundamentaj nocioj, sur kiuj baziĝas pensmaniero de ĉiu popolo. Dum mia prelego mi provos ekspliki al vi, kio estas natura semantika metalingvo, kiel ĝi povas helpi kompreni aliajn kulturojn, ankaŭ mi rakontos pri la plej gravaj konceptoj de la rusa kulturo de la vidpunkto de A.Veĵbicka.



D.S.Liĥaĉov - modelo de rusa intelektulo

Klera / Julia Samsonova
Moskvo, MEA MASI

Unu el la plej elstaraj rusaj humanismaj sciencistoj de la XX jarcento, historiisto, filologo, grava socia aganto Dmitrij Sergejeviĉ Liĥaĉev (1906 – 1999) montris per sia personeco tipon de la absolute rusa inteligentulo, patrioto de sia kulturo, malinklina tamen al naciismo. Al lia aŭtoreco atribuiĝas projekto de la Deklaracio de kulturaj rajtoj. Dum la prelego mi konatigos vin kun la biografio de la sciencisto kaj kun liaj ŝlosilaj ideoj pri historio kaj kulturo de Rusio, ĝia loko en la monda historio, pri la plej gravaj spiritalaj ecoj de la homo kaj pri ekologio de kulturo.



La mondoj de fratoj Strugackij

Mikaelo Bronŝtejn

Lumbildigita rakonto de la tradukinto de la 9 romanoj kaj persona koninto de Boris Natanoviĉ Strugackij – unu el la du plej famaj sciencfikciaj verkistoj de Rusio, fratoj Arkadij kaj Boris Strugackij.


Laŭ kontrakto, signita de eldonajo "Impeto" kaj la aŭtoro en 1996, dek du romanoj de fratoj Strugackij rajtas aperi en esperanto. Ĝis nun estas aperintaj dek, kaj la laboro daŭras.

Mikaelo Bronŝtejn prezentas la fratojn Strugackij – ilian ekstreme malfacilan, obstinan iron al monda rekono, verkojn, la plej ŝatatajn kaj amuzajn eventojn dum lia traduka laborego ĉe tiuj verkoj.

Fabeloj de la rusaj popoloj: historia, filozofia kaj scienca vidpunktoj

Anna Striganova
Moskvo

La unua genro de arto en la homa mondo, fabelo aperis en la nememoreblaj pratempoj... Rusaj mitologiaj skoloj havas diversajn vidpunktojn pri la deveno kaj evoluo de popolaj fabeloj, la sciencistoj traktas specialaĵojn de tiu ĉi antikva ĝenro, ĝian filozofian, psikologian kaj historian valoron. Fabeloj de rusiaj popoloj montros al ni, kiamaniere sub la influo de kulturoj kaj epokoj sinsekve ŝanĝiĝis religioj, kiujn hodiaŭ oni nomas paganismo. Ni ekscios la fontojn de multaj superstiĉoj kaj antaŭsignoj. Kaj rezulte ni konatiĝos kun diversaj kulturoj, ene de kiuj naskiĝis popularaj fabelaj estaĵoj...



Futura humaneco: transhumanismo kaj artefarita intelekto

Rakoen Maertens
Belgio

Rakoen estas studento de la Universitato de Gento (Belgio), esperantistiĝis dum Novjara Renkontiĝo 2012-2013. Mi estas gvidanto de la projekto "Delta Humanity" pri futura evoluo. Jam multaj jaroj mi okupiĝas pri persona evoluo (psiĥologio) kaj futura revolucio (transhumanismo). Nun mi volas prezenti kion mi lernis, kaj volas kombini miajn ideojn de psiĥologio kun teknologio. Mi ankaŭ prezentos la projekton, kaj rakontos kiel vi povus kunlabori por konstrui pli bonan futuron. Mi invitas al la kunlaboro esperantistojn de la tuta mondo. Kontaktinformon vi trovas ĉe www.rakoenmaertens.be



Aleksandr Blok kaj Lubočka Mendeleeva Lirika skizo

Anna Striganova
Moskvo

"Mi antaŭsentas vin"...

Somere 1898 Blok revenis en la eksterurban domon en Ŝaĥmatovo, kie li pasigis sian infanecon. Juna filozofianta poeto, urba loĝanto, li estis feliĉa mergiĝi en la mondon de simpla, pitoreska apudmoskva naturo, de montetoj, betuloj kaj someraj sonoraj pluvegoj. Kiam li renkontis Ŝin, Ŝi estis vestita en simplan vilaĝan robon kaj kronon el kampaj floroj. Ŝi ĉiam scipovis por la ferioj liberigi sin de ajna memoro pri vivo. Fine de la somero ili rolis Hamleton kaj Ofelion en la hejma spektaklo. Tiel komenciĝis historio de stranga kaj tragika por la ambaŭ amo, kiu naskis ciklon de la plej romantikaj poemoj de Blok – la "Versoj pri la belega damo".



E@I – Aktuale pri ĝia agado

Peter Baláž
Slovakio, E@I


Eĉ se vi konas E@I, vi, eble ne bone konscias, pri kio la organizo ĝuste en nunaj tagoj (semajnoj, monatoj) okupiĝas. Ĉiujn freŝajn novaĵojn vi povos ekscii dum la prezento. Plej lastaj (kaj ankaŭ nur planataj) projektoj, lastatempaj eldonaĵoj, retpaĝoj, EU-projektoj. Ni malkaŝos (preskaŭ) ĉion.



Konatiĝu: MEA MASI

Mirina / Irina Gonĉarova
Odincovo, MEA MASI
Klera / Julia Samsonova
Rjazanj-Moskvo, MEA MASI

Moskva Esperanta Asocio "MASI" (MEA MASI) estas la loka organizanto de la unua SES en Rusio, lanĉita de E@I. En la jaro 2015 MASI iĝos jam 20-jara, kaj ĝi havas vere gloran historion. Sed ni ŝatus rakonti al vi pri niaj nunaj celoj, streboj kaj konvinkoj, pri niaj aktivecoj, aranĝoj kaj E-kursoj, pri niaj sukcesoj kaj malfacil-aĵoj. Ni esperas, ke interesitoj povos ĉerpi el nia riĉa sperto iom da utilaĵoj por la propra loka kaj internacia agado.



Kio atendas paperajn librojn? Libro kaj elektronika mondo

Dima Ŝevĉenko
Moskvo, eldonejo "Impeto"

Kio okazas kun la merkato de tradiciaj paperaj libroj nuntempe? Ĉu ili malaperos? Ĉu aŭdvida enhavo anstataŭigos la tekston, kiel fonton de la informoj kaj inspiro? Ĉu estonte ekzistos la klasikaj libro-verkistoj? Kiaj ŝanĝoj nun okazas kun sistemo de kopirajtoj? Kie eblas trovi elektronikajn librojn en Esperanto kaj kio atendas ilin estonte? Dum la prelego ni provos respondi al tiuj ĉi kaj aliaj demandoj. Krome ni parolos pri la nuntempaj teknologioj kaj formatoj, kiujn eblas uzi por legi senpaperajn librojn.

Fabelaj mondoj

Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova
Moskvo, eldonejo "Impeto"

Projekto de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova "Fabelaj mondoj" estas historietoj, pupoj kaj bildoj, unuigitaj per unu sola temo – "Fabelo". Dum la prelego, ilustrita per niaj pentraĵoj, fotoj kaj pupoj, mi rakontos pri diversaj flankoj de la fabelo. Kaj pri la plej grava fabelo de la mondo, fabelo pri tio-ne-sciante-kio kaj ĝia feliĉa sekreto.



Diskutrondoj



Seminario Esperanto – Esperantio – Esperantiano

Aleksandro S.Melnikov


Ni traktos Esperanton kiel lingvon (Esperanto en ekstermovadaj enciklopedioj kaj fakte: miskriterioj, miskonkludoj, misprezentoj; rezonos pri evoluo de Esperanto kaj kiu "komandas" ĝin; enketos, ĉu en Esperanto ekzistas dialektoj, kiuj kaj kial „lingvaj militoj“ ekflamas en Esperantio k.a.). Parolante pri Esperantio ni diskutos ĝian „administran sistemon“ (ĉu ĝi estas ideala), ideologio(j)n, (mal)prosperadon, (mal)eston de „nure kaj pure“ Esperanto-kulturo k.a. Fine, ni debatos pri esperantianoj: ĉu ekzistas "tipa esperantiano / TE"; se jes, kia estas ties lingva personeco; ĉu TE-j havas komunajn psikologiajn kaj personec-kvalitojn; ĉu esperantianoj formas specifan „etnon“ k.a.



Civila militrezistado kaj ties rimedoj

Ingvar Enghardt
Svedio

Homoj ĉiam militis – ĉu ne? Pro kiuj kaŭzoj? La homaro konas grandiozajn batalkampojn: Stalingrado, Hiroŝima, Hai Phong (gradoj de Holokaŭsto). Kion vi scias pri WRI – la elstara movado kontraŭ la frenezeco? Ni konatiĝu kun ties Deklaro kaj metodoj. Kaj respondos surprizajn demandojn, ekzemple: kio okazos se mi rifuzos ordenon de aŭtoritatuloj? Tion jam spertis Gandhi, Nelson Mandela, Rosa Clark, Martin Luther King. Kia povas esti la rezisto kontraŭ militoj kaj perforta politiko, kiun ni vidas tra la tuta mondo: en Usono, Ĉilio, Ĉinio, Israelio, sur la ekssovetia teritorio ktp? Ni dediĉu nian atenton por klare ekvidi la rezultojn. Kio estas la pacfortoj? Ni tuŝos la hodiaŭajn konfliktojn kaj krizojn. Kaj konatiĝos kun la nuntempaj Deklaroj de WRI. Venu, pacaj batalantoj!



Esperanto-literaturo – ĉu ni daŭre legas ĝin? Diskutrondo

Peter Baláž
Slovakio, E@I

Ĉu vi legas Esperanto-librojn? Ĉu ofte? Kiam lastfoje vi aĉetis E-verkon? Kiujn aŭtorojn kaj kiujn literaturajn ĝenrojn vi preferas kaj kial? Kia estas estonto de la E-literaturo - en la mondo de ciferecaj libroj sed same en la tempo de apenaŭa legado en plejparto de la mondo? Kiaj estas novaj E-eldonaĵoj de la jaro 2013/14 kaj kio estas planata? Venu diskuti pri „ni kaj E-literaturo“ kun eldonisto kaj pasia leganto Peter Baláž.

Kiel organizi Lingvajn Festivalojn

Aleksandr Blinov
Mirina / Irina Gončarova

Lingvaj festivaloj en Rusio havas gloran historion. Antaŭ 19 jaroj ilin lanĉis en Ĉeboksari Aleksandr Blinov – la prezidanto de la Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko. Precize post 10 jaroj Irina Gončarova, la kunordiganto de EK MASI, startigis la festivalon en Moskvo. La festivaloj pasas ankaŭ en aliaj urboj de Rusio. Ili ĉuj havas similan stukturon kaj similajn celojn, tamen restas tre diversaj. La iniciantoj kaj gvidantoj de la du plej imponj festivaloj en nia lando rakontos, kiel organize la eventon kaj kiel efike promocii Esperanton dum ĝi. Venu kun viaj spertoj kaj demandoj! Eble, ĝuste vi lanĉos la novan Lingvan Festivalon – en via urbo!





Poŝtkruciĝo Prezentado kaj praktikado

Klera / Julia Samsonova
Rjazan'-Moskvo, MEA MASI

Kiam la mondo ankoraŭ ne ekhavis la Reton, la ĉefa ilo de esperantistoj por distance komunikiĝi internacie estis leteroj kaj bildkartoj, dissendataj per poŝto. Omaĝe al la glora pasinteco kaj al du internaciaj lingvoj – la lingvo de bildoj kaj Esperanto – la Moskva Esperanto-Asocio "MASI" organizis pasintjare, omaĝe al la Tutmonda Tago de Poŝto, la unuan akcion "Esperanto-Poŝtkruciĝo". Temas pri interŝanĝo de poŝtkartoj inter esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj.

La ideo kaj ĝia sukcesa realigo apartenas al Klera – kiu volonte rakontos al vi, kiel tio funkcias. Ni esperas, ke ne nur multaj el vi aliĝos al la poŝtkruciĝo, sed ke troviĝos eĉ kunlaborantoj por plu evoluigi tiun belan projekton. Por subteno de la iniciato jam nun alportu iun neuzitan belan poŝtkarton el via lando aŭ regiono! Kaj tiam ni sukcesos okazigi novan poŝtkruciĝon, startontan en SES-Rusio!



Verda vivo – niaj manĝkutimoj

Peter Baláž
Slovakio, E@I

Ĉu "verda lingvo" havas rilaton al "verda manĝo"? Venu diskuti la temon pri vegetaranismo, veganismo kaj aliaj manĝo-kutimoj kaj vivo-filozofioj kiuj ekzistas, pri iliaj avantaĝoj, ebloj, kondiĉoj, defioj. Senperforta vivstilo jes ja povas rilati

ankaŭ al viaj manĝo-kutimoj. Eble via vivo iĝos eĉ pli verda ol estis ĝis nun! :)



Ĉu geavoj bone influas genepojn? Diskutrondo

Iranta / Irina Gorodeckaja
u.Novoĉerkassk, E-klubo «NovoĈek»

Vi, kaj vi, kaj ŝi, kaj li, kaj ili – ĉiu havas unikan sperton! Ĉiu estas almenaŭ ies infano, filino aŭ filo. Ankaŭ multaj estas gepatroj, geavoj, genepoj... Kiel diversaj generacioj de unu familio influas unu la alian? Ĉu estas bone, kiam avoĉjo kaj avinjo edukas (ge)nepojn? Aŭ ili ofte faras el infanoj egoistojn? Kial junuloj iĝas senanimaj al siaj geavoj? Ĉiu el ni povas disdividi sian sperton, opinion, rakonti ian interesan kaj utilan por aliaj historion, rakonti pri moroj kaj tradicioj en sia familia, sia nacio, eble, sia religio, kiuj koncernas edukadon de gefiloj kaj genepoj. Ni invitas al diskutrondo ĉiujn, kiujn interesas tiu temo, kaj unuavice – geavojn! Venu, certe, ankaŭ gepatroj, gefiloj, genepoj! :)

Vi estas invitata kontribui

+ **Lingva Festivaleto:** la franca, la ĉina, la ĉuvaŝa, la itala, la hungara, la hebrea, la ukraina, la klingona, la slovaka, la dotrakia. **23.08**



Aligatorejo

Jana Ĥusanova
Ekaterinburg, E-klubo "Arĝenta Flamo"

Добрый день! Buongiorno! Good afternoon! Guten Tag! Esperantaj renkontiĝoj estas ne nur Esperanto. Esperanto helpas lerni aliajn lingvojn kaj ekzisto de multaj poliglotoj inter Esperantistoj pruvas tion. Sed ĉiu poligloto bezonas eblecon praktiki la parolatajn



lingvojn. En aligatorejo ni kolektiĝos por aligatori (paroli ne en Esperanto kaj ne en denaska lingvo). Dum diskutoj, ludoj, teumado ni ĝuos poliglota multlingvan etoson kaj eblon paroli en diversaj lingvoj.



Peĉakuĉo

Peĉakuĉo estas interesa prezentformato de kurtaj elpaŝoj, intence limigitaj je formo kaj daŭro. La celo de tiaj prezentadoj estas rapide konatigi la spektantojn kun diversaj interesaj ideoj, projektoj kaj temoj. Origine la vorto "Peĉa-kuĉa" signifas en la japana lingvo "babilado", sed oni konsideru, ke dum la prezentado oni rajtas paroli pri kiom ajn serioza afero.




Viaj prezentadoj

Mi rekomendas legi

Mirina / irina Gonĉarova
Odincovo, MEA MASI

Geamikoj, imagu ke alilandano petas vin nomi unu beletraĵon por pere de ĝi ekkoni ion gravan pri via lando, via kulturo, via popolo. Necesas rakonti pri tiu verko tiel, ke oni nepre ekdeziru ĝin legi, kaj poste legi koncernam literaturon plu kaj pli. Enhavo de via elpaŝo – laŭ via bontrovo. Vi povas rakonti pri historio de la kreado, pri la temaro, pri graveco por la kulturo de via popolo, pri aktualeco, pri kial ĝuste la verko estas proksima persone al vi. Nepre dediĉu 1 minuton por legi fragmenteton en la nacia lingvo. La tuta tempo de la prezentado: 15 minutoj.



Studio de bellegado

Mirina / Irina Gonĉarova
Moskvo, MEA MASI

Homoj, ĉu vi ofte voĉlegas en Esperanto? Ĉu vi ĝenerale havas tian interesan sperton? Eble, vi eĉ ne supozas, kian ĝuon eblas ricevi pro sonigado de bonkvalita prozo aŭ poezio en Esperanto. Venu gustumi! Probable, vi ne tuj kaptos la plezuron. Sed ju pli ofte vi relegos, ju pli vi kutimiĝos al la teksto, des pli vi alproprigos ĝin, des pli malfermiĝos renkonten al la verko via animo – kaj vi eklegos tiom sentoplene, ke la aliaj volonte aŭskultos vin – kaj ekŝatos la de vi prezentitajn tekstojn. Ni voĉlegos la tradukojn el la rusaj klasikuloj: Puŝkin ("La Ora Koko" kaj "Neĝblovado"), Lermontov ("Mciri"), Marŝak ("La reĝa buterpano"), Jerŝov (Ĉevaleto-Ĝibuleto), Koval ("Tabla Laktolo") kaj aliaj.



Skeĉo

Kiu parolas? – elefanto!
Laŭ la fabelo de Kornej Ĉukovskij

Iranta / Irina Gorodeckaja
u. Novoĉerkassk, E-klubo "Novocx-EK!"

Verŝajne, malfacilas trovi en Rusio plenkreskulon, kiu ne konis infanaĝe la amuzan poemon "Telefono" far rimarkinda rusa porinfana verkisto Kornej Ĉukovskij. Ĉu vi volas rememori (aŭ konatiĝi kun) tiu poemeto? Ĉu ni revenu en infanaĝon? Ni enscenigu "Telefonon" en Esperanto! Teatraĵeta sukceso dependos nur de vi. Jes, ĝuste de vi! Ĉu vi neniam aktorin aŭ opinias, ke via aĝo/sperto ne permesas al vi partopreni tiun seriozan/neseriozan aferon? Ĉio tio ne gravas! La roloj estas kurtaj, eĉ komencanto sukcesos! Des pli, ke la roloj ne parkerandos – ĉiu aktoro havos papereton kun siaj vortoj. Nu, ĉu vi konsentas? Rapidu! Kvanto de roloj estas limigita! Teatraĵeto "Telefono" kun via partopreno estos montrata dum la Internacia vespero! Vin atendas momento de gloro!



Scenigado de fotobildoj pri la temo "la vivo de ses!"

Mirina, Klera
Moskvo, MEA MASI

Se vi ŝatas foti, vi portos al la hejmoj amason da fotoj pri SES. Sed ĉu multaj el ili taŭgos por alloge kaj, eble, amuze raporti al la nevizitintoj pri nia vivo dum tiuj mirindaj tagoj? Ni invitas vin kune pripensi kaj prezenti malmovajn scenetojn el la SES-vivo. Poste ni faros el ili nian fotoraporton kaj metos en xiuj internet-resursoj de SES kun niaj komentoj. Venu fantazii, scenigi, teatrumi, amuziĝi, foti kaj fotiĝi! Kiel ekzemplo – unu el la vizioj de la foto-scenigado dum la ĉijara MASI-aranĝo "Apero" pri la temo: "Legu la librojn de la eldonejo IMPETO!"



Poezia horo

Mirina / Irina Gonĉarova
Odincovo, MEA MASI

Mi scias: nuntempe eĉ en siaj naciaj lingvoj oni ne multe legas poezion. Des pli – en Esperanto. Tamen – eble surprize troviĝos sciuloj, ŝatantoj aŭ eĉ poetoj? Aŭ tiuj, kiuj ĝuste en Esperanto poezion legado – almenaŭ pro scivolemo aŭ amo al nia lingvo. Kaj certe ekzistas homoj inter ni, kiuj mem poezion ne legas, sed ne kontraŭas konatiĝi kun tiu speco de Esperanta kulturo, aŭ simple ĉeesti en kvietita meditiga atmosfero. La dezirantojn deklami ni petas atenti donacojn de la eldonejo "Impeto", kiujn vi ricevos en la Akceptejo dum la registrado por SES. Vi povas elekti iun ajn poemon kaj prepari vian recitadon. Kompreneble, vi rajtas kunpreni kelkajn ŝatatajn poeziaĵojn el la hejmo kaj prezenti ilin. Estas permesate legi de vidata teksto, sed senstumble kaj plezure! Kaj la deklamantojn, kaj la aŭskultantojn atendas agrabla lirika vespero. Ne maltrafu ĝin!

Paroligaj rondoj



Novula programo
Darja Zelenina
Ĉelabinsko

Ĉu vi estas la novulo? Ni certiĝu: novuloj estas homoj novaj al la esperantista movado, kiuj esperantistiĝis antaŭ malpli ol jaro, ne ĉeestis aliajn esperantistajn aranĝojn kaj ŝatus scii pli pri e-kulturo. Se vi rekonis vin – venu al la Novula Programo!

Ĉu por esti esperantisto necesas nur paroli la internacian lingvon? Jes kaj ne. Dum La Novula Programo helpas al ĉiuj komencantoj eksenti sin hejme en Esperantujo: konatiĝi kun la historio de E-movado, kun esperantista muziko, literaturo, kongresa kulturo, esperantlingva Interreto kaj multaj aliaj esperantaĵoj kaj interalie ankaŭ praktiki la lingvon kaj konatiĝi kun aliaj.

- + La rusa lingvo **Natalia Laziĉ**
- + E-aktivemuloj **Peter / Dorota / Sabi**
- + **Arĝenta Societo** (vidu la programeron "Ĉu geavoj bone influas genepojn?" en la rubriko "Diskutrondoj") – **Irant** (**Irina Gorodeckaja**), **Mirina**
- + Infana programo **Irina Konopljanova**



Majstroklaso (metiejoj)

Ni lernu kantojn en Esperanto!

Mikaelo Povorin
Moskvo, klubo "Lev Tolstoj"

Al ni ege bonŝancis! Nian renkontiĝon partoprenos unu el la plej profundaj sciintoj de la rusia kanta Esperanto-kulturo Mikaelo Povorin. Li scias kelkcent kantojn en Esperanto kaj jam pli ol 30 jarojn regule kantas ilin kun gitara akompano por aliaj esperantistoj en renkontiĝoj.

Tradiciaj kantoj estas tre grava parto de la rusia Esperanto-vivo, kiu klare distingas ĝin de la okcidenta Esperanto-kulturo. Dum jardekoj oni verkadis ĉi tie por la plej belaj kaj ŝatataj melodioj esperantajn tekstojn, tradukadis famajn kantojn. Kaj certe inter kantoj, kiujn scias ĉiu rusia esperantisto, estas multaj originalaj: verkitaj de Dina Lukjanec, Vladimir Soroka, Ĵomart Amzeev kaj aliaj famuloj. Venu al la muzika leciono de Mikaelo Povorin por konatiĝi kun la plej bonaj kantoj de rusiaj esperantistoj!



Apudmoskvaj Vesperoj
Konatiĝu kun rusaj popularaj kantoj per Esperanto!

Gvidanto: Mikaelo Povorin
Moskvo, klubo "Lev Tolstoj"

Jen vera ĝuo por ĉiuj – kanti popularajn rusajn kantojn en Esperanto! Por esperantistoj estos multaj surprizoj: eble, vi eĉ ne supozis, ke tradukoj de viaj ŝatataj kantoj ekzistas. Por eksterrusianoj estas bonega ŝanco ekscii, pri kio temas la kanto, eble, iam aŭdata en la rusa lingvo,

lerni la melodion kaj ekscipovi ĝute kanti. Speciale atentu, ke la kanzonojn, kiujn vi nun lernos bele plenumi, vi havos eblecon kunkanti dum la Lignofajro, okazonta en romantika sabata apudmoskva vespero! Tial ni kune faros nian lignofajron neforgesebla!



Rusaj popolaj ludoj kaj dancoj

Jelena Alopina
u. Kovrov

Aj-da beluloj-bravuloj kaj belulinoj-lertulinoj, majstroj kaj majstrinoj! Eliru al la festo de naturo-patrino, fonto de fortoj niaj! Ĉu por danci sunan rondiron, ĉu por ludi rusajn popolajn ludojn...

Hebreaj dancoj

Jelena Alopina
u. Kovrov

Kiam eksonas flamiga hebrea muziko, la kruroj ekdancas mem - kaj restas nur sekvi movojn de nia senlaca gvidantino. Bonega humoro estas garantiita por ĉiuj! La aldona akiraĵo - scipovo danci kelkajn popolajn hebreajn dancojn. Invitataj estas ĉiuj - sen iu-ajn limigoj!



Historiaj dancoj
Marina Stepaĉova
Tjumeno, EK "Revo"

Ni invitas vin al semajna (ĉiutaga) kurseto de antikvaj Eŭropaj dancoj. Dum la kurso ni ellernos kelkajn dancojn el 14, 15 kaj 19 jarcentoj, konatiĝos kun danca etiketo, preparos kaj fine prezentos unu dancon dum la Nacia Vespero. Ni gustumos etoson de baloj, sentos nin verajn Damojn kaj Kavalirojn. Historiaj dancoj taŭgas absolute por ĉiuj, sendepende de aĝo kaj danca sperto. Kvanto de la partoprenontoj estas ne limigita! Havi paron ne necesas! Atenton

por eblaj partoprenontoj! Por dancoj necesas kunpreni taŭgajn ŝuojn: kun kovritaj kalkanoj kaj sen kalkanumoj. La virinoj prefere vestu mezlongan jupon.



Desegnado de homoj

Lena Ĥusnova
Jekaterinburgo, E-klubo "Arĝenta Flamo"

Ĉiu scias kiel desegni homojn per du punktoj kaj krampo. Sed ĉu vi iam revis ne nur desegni iun abstraktan homon, sed atingi similecon inter desegnaĵo kaj desegnata homo?

Dum majstroklaso vi ekscios sekretojn kiujn uzas pentristoj por desegni homojn. Lernante ilin kaj trejnante plu vi sukcesos rapide kaj bele

desegni ĉu belan nekonatulinon aŭ amikon, ĉu familian membron, iun ajn! Ne plu vi bezonos fotilon por havi memorojn pri iu homo!



Manfarado de slavaj protektpovaj pupoj

Irina Konopljanova (Sindona)

La ĉifonpupo ne naskiĝas mem: ĝi viviĝas helpe de imago kaj deziro de homo. Estante la parto de la kulturo de la tuta homaro, la pupo inkludas originalecon kaj karakterizajn trajtojn de la ĝin kreinta popolo. Al la slavaj protektantaj pupoj oni ekde antikveco atribuas diversajn sorĉajn ecojn. Ni kun vi faros pupon-sonorileton kaj pupon por ĝojo kaj bonaj stafetaĵoj. Imagu vin knabino el la for a pasinteco.

Venas la tempo, kaj la avino prenis el la sakrala familia kofro sorĉajn pupetojn, diverskolorajn ŝtofpecetojn, fabenbabenajn, kaj komencis instrui vin pri la antikva arto de pupa manfarado...



Bulkvastoj

Miri (MEA MAST)

Oni diras, ke bulkvastojn komencis kroĉi al siaj beretoj maristoj – por ke moligi frapojn je mallaltaj plafonoj. Poste oni ekuzis ilin por ornamo diversajn kapvestojn, skarpojn kaj aliaĵojn. Kaj nun ni iros plu kaj kreos amuzajn kolorajn lanugulojn. La bulkvastojn ni ankaŭ faros. Se vi ege volas, eblas plibeligi vian propran ĉapon aŭ alian veston. Do, bezonatas dek homoj kun lebremaĵoj kaj bona humoro!

Modlado de strigoj el polimera argilo

Miri (Jekaterina Lozina)

Ni modlos amuzajn fabelajn strigetojn. Do, prenu iom da polimera argilo, aldonu minimumon da kreemo kaj iom da magio... Kaj jen la sagaca birdo jam rigardis nin, preta malkaŝi iun sekreton. Aŭ eble dume atendi, pendi surkole aŭ balanciĝi breloke, studante la mastronkreinton? La majstro-klaso akceptas ĉirkaŭ dek personojn. Materialojn kaj necesajn ilojn ni disponigos. Bedaŭrinde, la rezervo de la disdonataj kreemo kaj magio estas limigita, sed da tiuj ĉe ĉiu majstro-strigfaranto malkovriĝas sufiĉ-kvante – kaj tio estas vaste konata fakto.



Koncertoj

Neniam sentu vin sola! Dancu kun Kimo!

Danio

19.08, mardo, 21:30-23:00

Apenaŭ kredeblas: al Rusio venas la fama Kimo!!!

Kim J. Henriksen el Danio estas denaskulo, legenda famulo de la junulara Esperantomovado kaj de Esperanta rokmuziko en la 80-aj kaj 90-aj jaroj, ĉefa etoso-kreanto de multaj junularaj internaciaj renkontiĝoj. Li estis unu el la fondintoj, kantisto kaj

akordionisto de la muzika grupo *Esperanto Desperado* en 1996, kiu unue nomiĝis *Brokantaĵoj*. En 1982 Kim partoprenis la glorie faman grupon *Amplifiki*. Estas li, kiu verkis kaj kantis la plej faman kaj popularan kanton de esperanta rokmuziko *Sola*.

Bonvenon al Rusio, kara Kimo!

La Antaŭlasta Trajn'

Kanta recitalo

Mikaelo Bronŝtejn

u. Tihvin, Tihvina Esperanto-klubo

22.08, dimanĉo, 21:30-23:00

Por vi la plej bonaj kantoj, verkitaj dum la 52-jara esperantumado de la aŭtoro.

Mi estas, kiel vi,
mi mem elektis tion,
ho vi, Esperantuj',
ŝatata vivdestin'!
Pro trafa koincid'
mi devas danki Dion:
vi estas kiel mi,
kaj mi adoras vin.




Rusiaj bardoj de la 20-a jarcento

Kanta prelego

Mikaelo Bronŝtejn

Post Stalin, post jardekoj de terura subpremo kaj humiligo, Sovetion venis nelonga periodo de relativa kultura liberiĝo. Tial en la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento ekĝermis la nova kanta ĝenro – tiu de amatora barda kanto – kiel opozicia respondo al la kantaro de oficialaj amaskomunikiloj. La barda movado envolvis dekmilojn da junaj adeptoj. Festivaloj de barda kanto, ekintaj ĉe Volga-rivero, kunvenigis ĉiujare ĝis 250 mil partoprenantojn. La tempoj ŝanĝiĝas, sed la aŭtoro kanto vivas. Elstara reprezentanto de tiu ĉi ĝenro Mikaelo Bronŝtejn prezentas kantojn de la plej eminentajn rusajn bardojn en propraj tradukoj.



Nur aŭtore...

Mikaelo Povorin

Moskvo, klubo "Lev Tolstoj"

18.08, lundo, 21:30-23:00

Estante vera fakulo pri la Esperanta kanta kulturo, en siaj koncertoj – Esperantisto jam kun 23-jara sperto, Mikaelo scias kaj kantas kun samideanoj ne malpli ol 200 komunajn kantojn. Tamen dum siaj koncertoj li plenumas, nur la proprejn verkĵojn, en plej diversaj ĝenroj. Por li tre gravas altkvalitaj tekstoj kaj fajnaj melodioj. En la zorge selektitaj por vi liaj kantoj vi trovos kaj amsopiron de sinĝenema junulo, kaj ĝojon pro baldaŭa renkontiĝo kun foraj amikoj, kaj bonkoran pretecon savi etajn bestojn (kiuj foje tiom similas al esperantistoj), kaj spritan satiron pri stultaj homaj superstiĉoj kaj malutilaj kutimoj, kaj ŝercan parodion al rusaj popolkantoj, kaj eĉ erotikajn impresojn de turisto en Italio.

Magiaj vokalmelodioj de udmurdoj kaj besermjanoj



Kantas **Natalja Dziga**

Dancas kun fajroj **Ksenija Sujarkova**

Moskvo

21.08, ĵaŭdo, 21:00-22:00



En Rusio loĝas multege da popoloj kun bunta kaj originala kulturo. La unuka artistino Natalja Dziga plenumos por ni la antikvegajn magiajn vokalmelodiojn de udmurdoj kaj besermjanoj. Bazo de iliaj kantomadoj estas improvizo kaj emocia impulso, ligita kun certa situacio: de naturaj fenomenoj ĝis gravaĵoj de homa sorto. La tekstoj de tiaj kantoj konsistas nur el interjekcioj, tial la sencon necesas serĉi en muziko, sentoj kaj emocioj de la plenumanto. Profundiĝi en la paganan mondsentemon de la antikvaj popoloj helpas al ni la sorĉaj dancoj kun fajro de Ksenija Sujarkova. Al ĉiuj homoj – la benaĵojn de la Tero!

Nacia Vespero

23.08, sabato, 20:00-22:00

El la profundo de l tempo ...

La teatra studio "Stary Gorod", vokala kaj ĥora studio "LIRIUS", ankaŭ Anton Somin, Arina Turkatenko, Valeriy Ĉovrebov, Maria Konoŝenko kaj Anna Popova prezentas la Muzikan vojaĝon "El la profundo de l tempo ...". Vin atendas gajaj rondoiroj, kantoj kaj dancoj de diversaj stiloj kaj ĝenroj. Ni kore invitas vin al nia koncerto!



Internacia Vespero

Dum internacia vespero amuzas la partoprenantoj la partoprenantojn. Dum ĉi tiu vespero vi havas eblon (kaj unikan, neripeteblan ŝancon prezenti al aliaj vian talenton, viajn kapablojn, vian artemon. Elektu kanton, dancon, deklamadon aŭ ion alian, kaj prezentiĝu kun via programero – por ke la vespero estu vere amuza kaj internacia. Anticipe kontaktu la gvidantojn pri la detaloj.

Sano kaj sporto



Minikurso de meditado

Peter Baláž
Slovakio

Prezento-diskuto-praktikado: Kio estas meditado? Por kio ĝi utilas? Ĉu eblas facile lerni ĝin? Kiel ĝi rilatas al esplorado de homa konscio? Kiel funkcias nia cerbo? Ĉu ni kapablas regi nian menson kaj atingi internan silenton? Budho – simpla homo kun malsimpla persistemo? Venu aŭskulti, diskuti kaj eble eĉ mediti :)

→ **Verda vivo – niaj manĝkutimoj**
Peter Baláž (vidu en la rubriko "Diskutrondoj")



Tempeo – mirakla, alternativa nutraĵo el Indonezio

Ingvar Enghardt
Svedio

Tempeo estas tradicia indonezia manĝo, vegetara altvalora proteina produkto, farebla dum 24 horoj. Ingvar malkovros al ni la sekreton de agnosko de tiu valora proteinhava manĝaĵo far de sciencistoj de la ekstera mondo kaj pri populariĝo de tempeo en okcidentaj landoj – kiuj pli kaj pli konsciiĝas pri sia misnutrado. Ni ekvidos la sojan industrion ankaŭ de ekologia vidpunkto. Ni ekscios, kiel kuiri kun esploro kaj fantazio, kaj miros pri varieco de soj-produktoj. Eĉ pli: al ni bonŝancos gustumi la kuirartaĵojn, kiujn Ingvar preparis speciale por ni dum tiu ĉi SES!

Konsultado de dermatologo

Konsultanto: d-ro Jelena Afanasjeva,
u. Volgodonsk

Profesia kuraciisto-dermatologo volonte konsultos ĉiun deziranton pri haŭt-problemoj. La konsultado pasos en Esperanto ;) Kaptu la okazon ekscii pli pri la propra sanstato kaj ricevi lingvan praktikon kun uzo de speciala leksiko!



Gorodki
Miri / Jekaterina Lozona
Moskvo, MEA MASI

Gorodki estas rusa nacia sporta ludo. Ludas du kelkaj teamoj. Dum la ludado de determinitaj lokoj oni devas per alcela ĵeto "elbati" bastonojn de figuro, kiun oni kreis diversmaniere el kvin lignaj cilindroj. Tiaj cilindroj nomiĝas "gorodki". Ĉi tian ludon plezure ludis rusaj verkistoj Tolstoj, Andrejev kaj Gorkij, kantisto Ŝalapin, kaj nun ludos ni. La celo de la ludo estas konsumi tiel malmulte da ĵetoj kiel vi povas por elbati "gorodki" eksteren de la kampo-"gorod". La unuan ĵeton oni faras de plej malproksima ĵetloko, kiu nomiĝas "kon". Se vi povos elbati "gorodok" tra limo de "gorod", sekvan ĵeton vi rajtas fari de proksima ĵetloko - "polukon". Kiu teamo uzos plej malmulte da provoj, tiu teamo venkos.

+ Rusaj popolaj ludoj. **Lena Alopina.** + Akva pilko en baseno. **Miri, Leon.**


Ludoj kaj distraĵoj

Intelektaj:

Vero-Falso
pri famuloj de la rusia kulturo
Intelekta ludo

Mikaelo Povorin

Ĉu estas vera aŭ falsa tiu aŭ alia fakto pri la famulo de la rusia kulturo? Tion decidus vi! Por ĝusta respondo ne nepras esti granda specialisto en tiu ĉi tereno de scioj. Sufiĉas havi ĝeneralajn fonajn informojn, foje simple scipovi rezoni logike aŭ fidi la intuicion. Ni invitas vin trasperti viajn elekt-kapablojn dum la aktiva kaj gaja ludo! La gvidanto voĉlegas iun fakton, kiu povas esti vera aŭ trompa, kaj demandas, ĉu oni kredas aŭ ne. Partoprenantaro dividigas je du grupoj: tiuj, kiuj kredas, kaj tiuj, kiuj malkredas. La gvidanto anoncas, kiu el la du grupoj divenis. La grupo, kiu eraris, aliĝas al la spektantoj. Kiuj elektis ĝustan



respondon, ludas plu. La ludo daŭras ĝis restos nur unu gajninto. Memkompreneble – la homo ricevas varmajn aplaŭdojn de la zelotoj kaj – la valoran premion!

Kio? Kie? Kiam?

Sporta intelekta ludo

Georgoj Kokolija, Moskvo

Partoprenu la plej popularan intelektan ludon en Rusio ekde sovetiaj tempoj! Jen la reguloj. Ĉiuj dezirantoj partopreni formas teamojn, maksimume po 6 personoj. La gvidanto legas por la teamoj demandojn, necesas trovi ĝustajn respondojn, uzante erudicion, inteligentecon kaj humursenton. Por pridiskuti ĉiun demandon kaj trovi la respondon teamoj havos 1 minuton, post kiu oni skribas sian version de la respondo sur speciala papero kaj fordonas al la ĵurio, post kio estas anoncata la ĝusta respondo. La gvidanto legas la sekvan demandon – ktp. Gajnos tiu teamo, kiu donos pli da ĝustaj respondoj.



Trompludo (konata ankaŭ kiel "Ludo PIV")

Ĉiuj dezirantoj partopreni formas de 3 ĝis 6 teamojn, la kvanto de teamanoj ne gravas, foje sukcesas eĉ unupersonaj teamoj. La teamoj ricevas kelkajn rarajn vortojn, kies signifon scias neniu el la ludantoj, kaj 20-30 minutojn. Dum tiu tempo ĉiu teamo devas por ĉiu el la vortoj elpensi iun signifon kaj verki versimilan vortaran aŭ enciklopedian difinon. Poste ĉiuj rekolektiĝas, la teamoj fordonas al la gvidanto siajn difinojn kaj okazas la dua parto. La gvidanto por ĉiu vorto legas en hazarda ordo teamajn difinojn kaj la veran. Ĉe tio la teamoj devas konjekti, kiu el la difinoj estas vera. Ĉiu teamo ricevas 1 poenton, se konjektas pri la vera difino de iu el la vortoj, kaj 2 poentojn, se iu alia teamo elektos elpensitan de tiu teamo difinon kiel la veran. Gajnos la teamo, kiu kolektos pli da poentoj.

Lingvaj:




ТИК-TAK-BUM

Mikaelo Povorin

Venu ludi «Tik-tak-bum»!

Ludantoj sidas ronde ĉe tablo. La unua ludanto tenas specialan horloĝan bombon. La ludanto ŝaltas la bombon, kaj ĝi komencas tiktaki. Li prenas el la stako karteton kun silabo kaj diras laŭte rememoran vorton kun tiu silabo al ĉiuj, transdonas la bombon, kaj alia ludanto penas rapide elpensi novan vorton kun la sama silabo. En kies manoj la bombo eksplodas, tiu malgajnas la rondon, kaj la karteto kun la malgajniga silabo iĝas lia. Poste ĉio ripetigas same, ĝis kiam finiĝas la kartetoj. Venkas tiu, kiu fine havas plej malmulte da kartetoj (aŭ eble eĉ tute ne havas ilin). La ludo estas frenezige gaja! Ĝi donas eblecon al komencantoj lerni novajn vortojn, kaj al spertuloj - kompili nekutimajn vortojn. Ni garantias, ke tiu ludo plaĉegos al vi! Kvanto da ludantoj estas ne limigita.



Ĉapelo

Klera / Julia Samsonova

Moskvo, MEA MASI

"Ĉapelo" estas ludo por granda kompanio. Ĉiu ludanto skribas kelkajn vortojn sur apartaj paperetoj, kiuj estas enmetataj en la ĉapelon. Poste ĉiu ludanto laŭvice eltiras la paperetojn kun vortoj kaj provas klarigi ilin al sia partnero. Se la vorto estas divenita, po sama kvanto da poentoj ricevas kaj la klariganto kaj lia partnero. Reguloj de la ludo sufiĉe simplas, sed iĝi gajninto estas ne tiom facile: ja la tempo por klarigi vorton estas limigita, partneroj konstante ŝanĝiĝas, kelkaj el la vortoj en la ĉapelo povas esti tute nekonataj al vi, kaj uzo de samradikaj vortoj aŭ gestoj estas strikte malpermesita! Tamen, ludi "Ĉapelon" estas nekredeble gaje, amuze kaj klerige.

Tablaj:

- **Karkason**
Strategia ludo de Klaus-Jürgen Rede
- **Puĉo**
Ĉu vi ne kredas min?
Psikologia kartludo
- **Koloretto**
Buntkolora logika ludo
- **Turo**
Gaja tabla ludo kun ruiniga fino
- **Sabotulo**
Karta psikologia ludo pri gnomoj-orserĉantoj



Fotoĉasado

Urba kvesto

Lena Ĥusanova, Jana Ĥusanova

Ni invitas ĉiujn ŝatantojn vagadi memstare tra la urbo kaj serĉi vidindaĵojn al la urba kvesto "Fotoĉasado". En nia teĥnologia jarcento ĉiuj jam forgesis kiel interese estas vagadi en nekonata urbo memstare kaj serĉi belajn lokojn. Ĉion montras al ni GPS, interreto kaj aplikaĵoj en saĝtelefonoj. Ni rememoru malnovan tempon! Uzante nur paperan mapon ni serĉos plej interesajn kaj belajn lokojn en Moskvo, ne nur konatajn al ĉiuj vidindaĵojn, sed ankaŭ ne tre konatajn interesaĵojn. Ni faros liston de interesaj kaj belaj lokoj en Moskvo, al kiu partoprenantoj povas aldoni laŭ deziro

lokojn, kiujn oni volus viziti. Partoprenantoj formas teamojn, kies tasko estos trovi ĉiujn lokojn de sia listo pli rapide ol aliaj kaj fotiĝi en ĉiu loko. Post la fino de la kvesto partoprenantoj povos uzi liberan tempon por daŭra promenado tra Moskvo laŭ deziro.

La kvesto pasos la 21-an de aŭgusto, ĵaŭde, dum la Tuttaga ekskurso, samtempe kun la ekskurso al la urbo Sergiev Posad. Programeroj en la ripozejo "Komponent" en tiu tago ne estas antaŭvidataj.

Kinejo

Matthieu Desplantes

Francio, E@I

Dum nia SES preskaŭ ĉiutage estos projekciataj filmoj kun Esperanto-subtekstoj. Atendas vin diversaj specoj de filmoj – fabeloj, komedioj, scienc-fikcio. Detala programo de la filmoprojekciado aperos en la program-libro de SES. Listo de montrotaj filmoj:

- Seksmisio (Seksmisja). Sciencfikcio, komedio. Pollando, 1984.
- La knabino kun oranĝoj (Appelsinpiken). Dramo, romantiko. Norvegio, 2009.
- En Juli(o) (Im Juli). Vojaĝfilmo, komedio. Germanio, 2000.
- La ŝranko (Le Placard). Komedio. Francio, 2001.
- Starbuck. Komedio, dramo. Kanado, 2011.
- Vuk. Animacia filmo. Hungario, 1981.
- Estas mirinda vivo (It's a Wonderful Life). Dramo. Usono, 1946.



Ekskursoj

Tuttaga



21. 08, 09.15-20.00.
Tuttaga ekskurso: Al
Sergiev Posad /
Fotoĉasado en Moskvo.

Duontagaj



19. 08, 14.15-20.00. Klin. Domo-muzeo de P.I.Ĉajkovskij.
Ekspozicio pri muzikisto-esperantisto Taneev. Muzeo de
kristnaskarbaj ludiloj.

20. 08, 14.15-20.00. Kinourbo
“Pilgrimporto” kaj bieno Serednikovo.



22. 08, 14.15-20.00. Ŝahmatovo. Domo-muzeo
de A.Blok.



